# tejo:aktuale

n° 518 | Julio 2026

**Karaj abonantoj, bonvenon al la julia eldono de TEJO-aktuale!**

Plej varma tempo alvenis, ne temas nur pri la vetero en Eŭropo. Ni alludas enorman kumuliĝon de laboro, kiun kaŭzas du rapidege alproksimiĝantaj, plej grandaj Esperantaj eventoj de la jaro, en kiuj ni estas engaĝitaj.
Konrado forlasis jam Roterdamon por brave subteni la Libroservon de la Universala Kongreso, reprezenti dum la evento nian organizon kaj rakonti al la partoprenantoj, kiel aspektas nia kutima-nekutima volontula vivo.
Dume, aliaj finordigas ĉiujn bezonataĵojn por la Internacia Junulara Kongreso. Ni preparas por ĝi kelkajn programerojn, do sekvu atente la programon por ne maltrafi ilin.
Ni esperas, ke ni renkontiĝos kun multaj el vi, karaj legantoj, en Katalunio, jam post kelkaj tagoj. Bonan kongresumadon al ĉiuj partoprenantoj de la kongresoj.
Ĝis tuj!

## ANONCOJ




### Ekkonu la novajn reprezentantojn de TEJO!

Ni ĝojas prezenti la elektitajn reprezentantojn, kiuj kunlaboros kun diversaj internaciaj organizoj kaj partneroj. 🌍

**UNOY**: Vuk Mladenović
**FoJE kaj Interŝanĝa grupo**: Lucía Montserrat Fernández Barrera
**UNESKO**: Espoir Ngoma Kasati kaj Jenna Randimbison
**Konsilio de Eŭropo**: Francesco Giuliano
**CoNGO kaj ECOSOC**: Quintyn Bobb

Ni deziras al ĉiuj tiuj kuraĝuloj multe da sukceso pri la reprezentado de la voĉoj de junaj esperantistoj en la internacia komunumo.




### TEJO-bingo

TEJO okazigos **du bingojn** kun la celo akiri donacojn. Vi povos partopreni ilin dum la 111-a Universala Kongreso en Graco kaj dum la 82-a Internacia Junulara Kongreso en Tiana.
Ekhavu kuponon por donaco de minimume

10 eŭroj (dum UK) aŭ de nur 5 eŭroj (dum IJK). Se vi jam donacis, vi ne bezonas donaci denove.
**Simple venu al la bingo kaj provu vian ŝancon!**
Krome, ni serĉas aldonajn premiojn por la ludoj. La premioj povas esti: senpaga abono de revuo, senpaga aliĝo en kongresoj, libroj ktp. Se vi aŭ via organizo ŝatus donaci premion por nia bingo, kontaktiĝu kun ana@tejo.org.




## Artikolo de The Guardian pri Esperanto

Ĉu Esperanto vere apartenas al la pasinteco? Nova reporteraĵo de *The Guardian* montras viglan internacian komunumon, kiu vivas per renkontiĝoj, vojaĝoj kaj komunaj idealoj. De fervojistoj kaj pacifistoj al anarkiistoj kaj nudistoj, ĉiuj sentas sin bonvenaj en bunta kunvivado.

Kio estas via opinio pri la artikolo? 🗞

---

# EVENTOJ




## Internacia Junulara Kongreso

9-16 de aŭgusto 2026
Tiana, Katalunio (Hispanio)

Partoprenu en la 82-a IJK por sperti tre raran plenan suneklipson, ĝui regionon riĉan pri kulturo, historio kaj gastronomio, kaj pasigi varman someron ĉe belaj plaĝoj kaj verdaj arbaroj kun esperantistoj de la tuta mondo!
Jen la plena programo:
http://programo2026.tejo.org

Jen eta bonveniga filmeto por ke vi povu koni La Conreria, la kongresejon de IJK 2026.😊

Vi povas aliĝi al la oficiala babilgrupo kaj aboni nian informkanalon en Telegramo. Se vi havas demandojn aŭ proponojn, simple alskribu nin.

Venu pasigi eksterordinaran kaj memorindan someron kun ni!

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**

# tejo: ~~aktuale~~ eventuale

La plej freŝaj novaĵoj kaj ĝisdatigoj el la TEJO-mondo. ⚡




**Anonco por ĉiuj niaj karaj klingonaj amikoj!**

tlhIH! maQuch. **IJK** ghoS! CatalognaDaq, TianaDaq, tera' jar wa'DIch Hut jajmo' qaSDI' tera' jar wa'DIch wa'maH jav jaj, tlhIHvaD may' bommey je wIqel. pem Hov botlh'e' yIlegh! latlhpu' yISov, juppu' chu' yIghaj, latlh Sepmey porghmoHbogh ghu' yIQap! DaH yIghoS!




**🗺 Lernu geografion kun TEJO-volontuloj!**

Finfine kreiĝis ŝtato por nia kara esperantista komunumo! Venu malkovri, kie troviĝas **Esperantujo***, kaj malfermu vin al la surprizoj de ĉi tiu nova realaĵo.

* Baldaŭ ni publikigos pli detalajn informojn pri kiel atingi ĝin per niaj karavanoj, kiel akiri civitanecon, kaj kiel konstrui vian estontecon en via nova hejmo.




**Pasporta Servo enkondukas kvinstelan kategorion**

Por faciligi la elekton de gastigantoj, Pasporta Servo ekde nun uzos **hotelan klasifiksistemon.** Kvin steloj signifas apartan ĉambron, matenmanĝon kaj akompanoj de karesema kato. Unu stelo signifas plankon, litkovrilon kaj la nerifuzeblan duhoran prelegon pri la historio de la loka klubo.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2026 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands